

1

Junio 2020



Kvar insignoj tre gravaj por DEFA dum ĉiuj jaroj: FISAIC, IFEF ... kaj du DEFA-insignoj

La fino de DEFA – kaj de Dana Fervojisto

Karaj amikoj kaj legantoj,

kondiĉoj ŝanĝiĝas, kaj kelkfoje oni devas pripensi la situacion kaj reagi laŭ ĝi.

Dum dek jaroj nun ni ne havas lokajn grupojn, sed tutlandan asocion. Ĝi dum tiu periodo pli kaj pli ŝrumpis ... aĝaj membroj forpasis, kaj ni ne – tion ni devas konstati – kapablis altiri novajn homojn al nia societo. Mi en mia Esperanta vivo renkontiĝis kun tre malmultaj homoj, kiuj opiniis, ke Esperanto etas malbona ideo, kaj se mi rakontas pri miaj travivaĵoj kaj la eblecoj, kiujn Esperanto donis al mi, ĉiuj ĝojas kun mi ... sed de tie al lermado de la lingvo estas tre granda distanco.

DEFA eniris 2019 kun sep membroj, kaj nun (majo 2020) ni estas kvar. Ni estas nur du membrj de Jernbanefritid, kaj pro tio ni ne plu povas esti asocio kadre de ĝi ... kaj la fervoja rilato estis ja ĉiam la bazo de DEFA. Ni multe pripensis la situacion ... sed finfine venis al la konkludo, ke ne plu havas sencon agi kiel asocio.

DEFA kiel asocio ĉesas ekzisti – kadre de Jernbanefritid kaj ankaŭ kadre de IFEF. La du restantaj membroj restos individuaj membroj de IFEF.

Certe estas kelkaj, kiuj opinias, ke se la asocio 'forvaporigās', neniam plu ĝi povus restariĝi. Ni opinias, ke se estas homoj, kiuj tion VOLAS, povas okazi ...

Samtempe mi devas informi, ke tiu Dana Fervojisto-bulteno estos la lasta.

Estas vere malfacila decido, sed estas la reala mondo, en kiu ni devas agi ... estas bonaj tempoj, kaj estas malbonaj tempoj. Ni ĝoju, ke DEFA iĝis pli ol 70-jara – kaj ni devas memori ĉiujn bonajn agojn, kunestojn, vojaĝojn, kongresojn ... ĉiu el ni havas multajn memorojn neforgeseblajn.

Mi dankas en la nomo de DEFA al ĉiuj vi, kiuj sekvis nin kaj akompanis nin tra la jaroj. Mi esperas, ke vi ĝuos tiun DF-on, eble iom pli ol kutime, kaj mi deziras al vi ĉiuj ĉion plej bonan.

JUN



**Legu la kajerojn kun intere-
saj kaj tre variaj fakartikoloj ...**

Nova kajero aperis!



Ni memoras ...

Dum la lastpasintaj monatoj forpasis du signifaj DEFA-uloj, du tre bonaj amikoj ... Erik kaj Karen.

Erik V. Mortensen - 24/6-1925 – 18/11-2019

Post longa kaj tre aktiva vivo Erik Verner Mortensen trankvile forpasis en sia hejmo meze de novembro, 94-jaraĝa.

Sendube vi ĉiuj konas Erik kaj liajn meritojn. Li estis ĈIE kaj partoprenis nekalkuleble multajn aranĝojn dum sia Esperanta vivo, kiu komenciĝis en 1954. Li ĉeestis la plej grandajn kongresojn kaj la plej malgrandajn, intimajn aranĝojn, precipe kune kun Astrid.

En- kaj eksterlande li vigle kontribuis al la bonfarto de aliaj ... li estis 'socia gluaĵo', sen kio neniu asocio, vojaĝgrupo, societo aŭ amikeco povas funkcii. Erik havas amikojn ĉie en la mondo, kaj li tenis la kontakton ... nur malmultaj kapablas tiagrade tion fari. Ni estas multaj, al kiuj li nun mankas.



Erik diris mem, ke li ne estas 'organiza homo' – li ne celis al estraraj postenoj, sed tamen li sperte organizis plurajn IFES-ojn, - kvankam 'platlandano'. Li estis bona skianto kaj dum multaj jaroj ĉiujare skiferiis en la Alpoj – li sciis, kion volas havi la homoj!

Ni ĝojas, ke ni havis la eblecon konatiĝi kun li kaj esti amikoj dum preskaŭ 40 jaroj. Kune kun familianoj kaj aliaj amikoj ni adiaŭis kun Erik 29/11-2019 per memoreremonio kaj poste per bona lunĉo ... kiun lia bofilo enkondukis per la vortoj:

'Erik ŜATEGUS sidi kun ni ĉe la tablo!'

Karen K. Olsen, 29/11-1929 – 26/3-2020

Longan, bonan kaj enhavoriĉan vivon Karen havis. Ŝi venis de la insulo Fyn, sed kiel junulino ŝi transloĝiĝis al Kopenhago, kie ŝi kelkajn jarojn laboris ĉe DSB en la administraciaj oficejoj en la tiama ĉefsidejo *Sølvgade 40*. Kiam ŝi renkontiĝis kun Henning kaj edziĝis al li, ili kune decidis, ke ŝi ne laboru eksterdome. Ŝi majstris la hejmon kaj prizorgis grandan ĝardenon, kie ili loĝis ... i.a. sur la insulo *Samsø* kaj poste multajn jarojn en *Næstved*. Henning apartenis al la generacio de fervojistoj, kiuj transloĝiĝis pro la laboro. La du infanoj ankoraŭ nun kun ĝojo rememoras pri la infaneco, ke Karen estis hejme ĉe ili.

Henning faris organizan 'karieron' en IFEF, kaj dum multaj jaroj ili kune vojaĝis al kongresoj, estrarkunvenoj ktp. Karen estis 's-ino Olsen', sed ankaŭ si mem kun granda scio kaj obstina volo!



Somera ekskurso 2017 – Karen kun amikoj

'Hejme' en la Kopenhaga DEFA-klubo Karen estis la praktika mirakulino, kiu povis organizi bonajn klubvesperojn, gajajn festojn kaj belajn ekskursojn. Ŝi estis '*master chef*' en la kuirejo, - tion memoras certe kelkaj el vi, kiuj tion-ĉi legas.

Ni dankas pro ĉiuj belaj memoroj pri klubaj vesperoj, vojaĝoj, kunestadoj ...

Jan kaj Lene, DEFA



IFEF prokrastas la 72-an kongreson al 2021 kaj same ŝovas la deciditan 2021-kongreson en Beroun, Ĉeĥio, ĝis 2022. Sed por UEA estas alia afero. Oni devas prokrasti la 2020-kongreson, la 105-an UK-on, sed jam progresis tiel la planado por la 106-a UK en Belfasto, Britio, ke oni ne povas ĝin ŝovi. Pro tio la UK en Montrealo okazos en 2022.



Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

UEA

Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

Kopenhago

Kunvenoj de KEK (prezidanto: *Bent Jensenius*, tel 38 60 15 86, retadreso kek.informo1@gmail.com) okazas en *Carit Etlars Vej 6, la kelo, Frederiksberg*. La metro-stacio Frederiksberg Allé tre proksimas. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk

Kontaktulo pri DEFA: La prezidanto.

Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de Århus en *Folkestedet, Carl Blochs Gade 28, 1^a etaĝo, salono 7*, je h 19.30, la lastan ĵaŭdon de la monato.

Norda Jutlando:

Kunvenoj de Nordjutlanda Esperanto-Klubo (informoj: *Ejnar Hjorth*, tel. 98 13 40 40) okazas en la vintra sezono (septembro-majo) ĉiumerkrede je la 15-a horo en *Christiansgade 38, 1., Aalborg*

Kompreneble dum la lastpasintaj monatoj okazis multaj ŝanĝoj kaj nuligoj. Kontaktu la unuopajn asociojn por informiĝi.



Ĉu ankaŭ vi forgesis vian fridujon en la trajno?

La DSB-sekcio pri trovaĵoj, *DSB Hittogods*, ĉiam havas ion por fari. La sekcio ricevas jare milojn da telefonoj, komputiloj kaj aliaj elektronikaĵoj, kiujn homoj forgesis en trajnoj aŭ stacioj. La estro de la sekcio, Lill Andersen, kiu deĵoris tie multajn jarojn, ne plu povas surpriziĝi. Tamen ŝi rakontas pri unu ekzemplo pli stranga ol aliaj:

Estis granda fridujo/frostujo kun granda ora banto, kiu envenis la salonon de *DSB Hittogods* en la ĉefstacidomo de Kopenhago. Montriĝis poste, ke la sudgermana paro, kiu kunportis ĝin, tranoktis en Kopenhago survoje al geedziĝa festo en Stokholmo. Ili estis sufiĉe ebriaj, kiam ili forlasis la trajnon sen la fridujo, kaj ili venis la venontan matenon pentoplenaj. Espereble kaj fridujo atingis la novgeedzojn ... verŝajne estis donaco.

Sed ne nur objektojn homoj forgesas. Antaŭ nelonge la trajnpersonaro venis kun infanĉaro KUN infano! Montriĝis, ke la patrino, kiu entrajniĝis en *Nørreport*, unu el la tre uzataj stacioj en Kopenhago, subite ekpripensis, ke ŝi forgesis validigi sian bileton. Ŝi kuris sur la peronon, validigis ... kaj la trajno foriris sen ŝi, sed kun la infano!

La sekcio *DSB Hittogods* havas bonan kunlaboron kun la polico, kaj post du ŝvitegantaj horoj la patrino kaj infano denove unuiĝis.

Oni povas diversmaniere, elektronike kaj persone, serĉi siajn forgesitajn aferojn. *DSB Hittogods* gardas la aferojn sep tagojn kaj poste transdonas al la polico, kiu gardas dum du monatoj.


Ĉirkaŭ 70% de la forgesitaj objektoj retrovas sian posedanton.

Plezurvojaĝo en la 19-a jarcento

Mark Twain, famkonata usona verkisto, kiu vivis 1835-1910, komence de sia kariero verkis vojaĝpriskribojn. Li estis senripoza perono, kiu multe movis sin kaj multe vojaĝis.

En 1867 li partoprenis en la unua 'plezurvojaĝo' per ŝipo – de New York al Eŭropo kun la fina celo, La sankta Lando kaj Jerusalemo, kaj reen. La vojaĝo daŭris proksimume jaron ... multloke oni elŝipiĝis kaj faris ekskursojn dum semajnoj kaj kelkfoje monatoj. Ekz-e li vizitis Parizon kaj signifajn urbojn en Italio (per fervojo) kaj Palestinon kaj Sirion (ĉevalkaravane).

Mark Twain eldonis en 1869 du-voluman libron pri la granda aventuro: '*The Innocents abroad*', en dana tradukita al 'Naivaj vojaĝantoj'. Ĝi estas kvazau nask-atestilo de la krozaĉ-industrio, kiu hodiaŭ ekzistas ... vojaĝi nur por plezuro siatempe estis tute nova fenomeno. Kaj, ne malplej, la libro estas TRE amuza ... Mark Twain vigle, humurplene, sarkasme skribas - li havis akran plumon.



Li ofte 'primokas' la multajn 'unikajn' vidindaĵojn kaj relikviojn, kiujn oni montras al 'la naivaj vojaĝantoj'. Li ne skribas, ke li ne fi-

das ... tute inverse – li skribas, ke ‘ne estas iu ajn kialo dubi pri tio’ k.s. Ekz-e pri la Tuko de Veronika: En Jerusalemo ili preterpasis la domon, kie Veronika loĝis (antaŭ 1.800 jaroj – impone, ke la domo ankoraŭ staras!). Kiam Jesuo survojis al la krucumo, ŝi eliris la domon kaj forviŝis la ŝviton de la frunto de Jesuo. Oni montris la tukon, kaj Twain skribas: ‘Ni bone konis jam la historion, ĉar ni vidis la tukon en Parizo kaj ankaŭ dufoje en Italio.’ Naivaj vojaĝantoj!

Etan alineon mi provis traduki el la dana al Esperanto. Oni devas pripensi, ke la dana traduko (eldoniĝis 1884) estas verkita en lingvaĵo 1880-stila, kaj tion mi eĉ ne provas redoni ... trovu mem la libron, mi povas nur rekomendi ĝin!

Fine de la vojaĝo, post vizito al La sankta Lando, la kulmino de la tuto, kaj antaŭ vojaĝi hejmen tra La mediteranea Maro kaj poste La atlantika Maro, Mark Twain kaj la aliaj 65 pasaĝeroj vizitis Egiption. Oni sentas, ke li nun laciĝas ... dum la tuta libro li detale, eĉ TRE detale, ĉion priskribas, sed pri Egiptio li skribas, ke ĉio similas al jam priskribitaj aferoj. Tamen, pri la fervojo li mallonge skribas:

Mi ne volas ĵeti min en priskribojn pri la fervojoj ĉi-tie, ĉar ili similas al ĉiuj aliaj fervojoj, sed mi volas parenteze rakonti, ke la brulmaterialo, kiun oni uzas por la lokomotiv-kaldronegoj sole nur konsistas el mumioj tri mil jarojn aĝaj, kiujn oni aĉetas je tuno aŭ je tombejo por tiu uzo, kaj ke kelkfoje oni aŭdas krion de profana, malbonhumora hejtisto:


*‘Estu damnita tiu simpla kanaljaro! Ne estas por unu eŭro da brulaĵo en ĝi - donu al mi reĝon!’ *)*

**) Rakontita al mi kiel veraĵo. Mi nur redonas, kion mi aŭdis. Mi volonte mem fidas. Mi povas digesti ĉion ajn. (piednoto de la aŭtoro)*

Odense Letbane – la urbo en moviĝo



Jam dum jaroj oni laboras kaj laboras ... ĝenas trafikon, ĝenas najbarojn, ĝenas la komercan vivon ... por konstrui modernan tramvojon en *Odense*, la tria plej granda urbo de Danio.



Mapo de Odense Letbane

De la suda antaŭurbo *Hjallelse*, tra la urba centro ĝis la norda antaŭurbo *Tarup*, per itinero de 14,5 km kun 26 haltejoj ĝi estos ligilo en la urbo en tute alia maniero. *Odense Letbane* estos grava kaj forta elemento de la urba evoluo kaj la ligo inter malsanulejo, universitato, loĝkvartaloj, administra kaj komerca centroj.

En la projektgrupo oni konscie provis lerni de antaŭaj similaj (laŭ tekniko kaj amplekso) projektoj en Danio kaj eksterlande, sed kompreneble tamen aperis obstakloj, kaj okazis prokrastoj. Laŭ la nuna plano oni ekveturos kun horaro kaj pasaĝeroj aŭtune 2021.



La ‘rulanta materialo’ estas de la fabriko *Stadler*, kaj la modelo estas *Variobahn*, konata jam de i.a. la tramoj/fervojoj en *Bergen* (NO) kaj *Aarhus* (dua plej granda urbo en Danio). *Odense Letbane* ricevos 16 trajnunuojn.

La trajnunuoj *Variobahn* longas 29 metrojn, larĝas 2,65 metrojn kaj altas 3,59 metrojn. Estas en ĉiuj pordoj senbariera eniro, kaj ne estas ŝtupoj en la tuta trajno. Estas loko por entute proks. 200 pasaĝeroj. La trajnunuoj havas lokon por rulseĝoj, infanĉaroj, bicikloj, rulapogiloj k.s.





Kompreneble oni uzis multan energion kaj multajn pensojn imagi al si, kiel ĉio aspektos, ankaŭ haltejoj aj ĉirkaŭaĵoj ... kaj feliĉe, ĉar se oni havus nur la impreson dum tiuj plej lastpasintaj jaroj en *Odense* kiel 'ordinara trafikanto', oni pripensus: 'KION ili volas fari?' Laborlokoj ĉie, bariloj ruĝ-blankaj ĉie, trafikĝenoj ĉie ... ĉu piede, bicikle, automobile, aŭtobuse, oni havis (kaj parte ankoraŭ havas) problemojn atingi lokojn ĝustatempe, uzi kutimajn itinerojn kaj trafikilojn.



Jen (sur antaŭa paĝo) imaga bildo pri la stacidom-centra placo meze en la urbo – kiam ĉio estos preta ... eble la fuenanoj estas pli realismaj ol optimismaj, rilate al la vetero!

Oni provis grandskale partoprenigi la najbarojn ... butikojn, aliajn komercistojn, instituciojn, loĝantojn. Multaj informoj surrete kaj surloke, kunvenoj, diversaj aranĝoj ... verŝajne oni nur post la inaŭguro de *Odense Letbane* povas vere prijuĝi, ĉu tiu granda klopodo sukcesis ... nur poste la homoj vere povas superrigardi ĉion kaj doni ilian impreson.



Unu el la multaj metodoj uzitaj por informi pri la laboro pri *Odense Letbane*: rulkabano, kiun oni movis kaj starigis diversloke en la urbo. La teksto diras: ‘Eniru kaj sciui pli pri *Odense Letbane*’.

Malgraŭ la malfruoj oni jam survojas pri konstruo de multaj haltejoj laŭlonge de la itinero ... ekzemple ĉe la granda butika centro *Rosengårdcentret*. Ĝi estas tre granda ... entute 150 butikoj, kafejoj kaj restoracioj, ĝi kovras 100.000 kvadratmetrojn, kaj en la parkejo estas loko por 3.000 aŭtoj. Tamen estas ofte ĥaoso sur la parkejo ... kaj oni esperas, ke la *Letbane*-haltejo ĉe la centro faciligos la trafikon.



Letbane-haltejo ĉe Rosengårdcentret survojas ...

Baldaŭ trafikos en *Odense* – kiel en multaj aliaj eŭropaj grandurboj – la tram/fervojo, - je la bono de ĉiuj.





Dana Fervojisto estas organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)

Prezidanto:

Jan U. Niemann
Murergade 7, 2.mf.
DK-3000 Helsingør
tel 71 70 63 83
aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Vakas
Kontaktu la prezidanton
Vidu adreson supre

Redaktantoj: Jan kaj Lene
Niemann
Vidu adreson supre.

Preso: M72MF

Per tiu numero ĉesas aperi
Dana Fervojisto.

Enhavo:

paĝo 2	Mesaĝo de la prezidanto
paĝoj 4-6	Ni memoras
paĝo 7	Aktivecoj
paĝo 8	Ĉu ankaŭ vi forĝesis vian fridujon ...
paĝoj 9-10	Trajntravivaĵo de Mark Twain
paĝoj 11-15	<i>Odense Letbane</i>

Transponta Esperanto-Kongreso
germana - pola - fervojista



Frankfurt (O) / Slubice
21-a – 28-a de Majo 2021



La 72a IFK prokrastiĝis ĝis
2021.